

julio - septembro, 1976 13-a jaro, n-ro 3 (73)

# *l'omnibuso*

---

E. SPIRIDOVIĈ

## GENIA LINGVISTO VENKITA DE ETBURĜECO

FUNDAMENTAJ MOMENTOJ EN LA LINGVA TEORIO  
DE ZAMENHOF

(Enkonduka noto)

Ni reaperigas ĉi-sube gravan, sed malmulte konatan studon de la soveta esperantologo Efim Feofanoviĉ Spiridoviĉ (1891- ?). Ĝi unue aperis ruslingve en "Internacia Lingvo" (1931, n-ro 7), la teoria revuo de Sovetrespublikara Esperantista Unio, kaj poste en Esperanta traduko en "La Nova Etapo" (1932, n-ro 1), la organo de Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj. Sekvas la teksto de tiu traduko, kun kelkaj stilaj modifoj.

SUR LA VOJO DE PRAKTIKO

Zamenhof ne restigis sian lingvot teorion en sistemigita aspekto. Li opiniis, ke la ĉefaĵo por akcepto de internacia lingvo estas ne teoria pridiskuto de la demando pri ĝi, sed praktika agado -- movado por la lingvo internacia. Devenante el tio, li enmetis ĉiujn siajn fortojn por 'enradikigi' la principojn de sia teorio en la proponitan de li projekton de lingvo internacia, limigante sin nur per mallonga priskribo de tiuj principoj, sur kiuj devas esti konstruita la lingvo internacia kaj la movado por ĝi. Dum la daŭro de sia tuta vivo jaron post jaro Zamenhof eldonis diversajn verkojn, en kiuj li estis disvolvanta sian teorion. Kun la tempo

Zamenhof parolis:

Multajn fojojn mi ripetis... ke la esperantismo celas nur al tio, ke ia taŭga kaj vivipova komprenilo inter la popoloj ekzistu, sed ke la formo (Substr. L.Z.) de tiu komprenilo estas por ni... tute indiferenta; ke se, anstataŭ fari konstantajn kaj senfinajn eksperimentojn kaj teorian rezonadon, ni decidis elekti la pretan kaj elprovi-tan lingvon Esperanto kaj labori speciale kaj ekskluzive por ĝi... ni faris tion ĉi... nur tial, ke la esploro kaj sperto montris al ni, ke tia maniero de agado estas la sola, kiu plej certe alkondukos nin al nia celo (Substr. E.S.)<sup>1</sup>.

Tiu ĉi precipe praktika vojo en disvolviĝo de la movado por lingvo internacia estas unu el la plej gravaj principoj en la teorio de Zamenhof.

Jen estas la ĉefaj verkoj de Zamenhof, en kiuj li prilaboris sian lingvoteorion:

1) La unuaj tri libroj: "Unua Libro de l'lingvo internacia", "Dua Libro", "Aldono al la Dua Libro" (1887-1888).

2) La nefinita traktaĵo "Esperanto kaj Volapük" (1889-1890).

3) La traktaĵo "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia" (1900).

4) La paroladoj en la internaciaj Esperanto-kongresoj (1904-1912).

5) Granda nombro de gazet-artikoloj kaj leteroj.

Ĉiuj ĉi verkoj estas eldonitaj en la plena kolekto: -- L. L. Zamenhof, Originala Verkaro. Antaŭparoloj, gazetartikoloj, traktaĵoj, paroladoj, leteroj, poemoj, kolektitaj kaj ordigitaj de d-ro Joh. Dietterle. Eld. F. Hirt u. Sohn en Leipzig, 1929. Pĝ. 604.

## LINGVO INTERNACIA -- ŜTUPO EN ĜENERALA LINGVOEVOLUO

Kiuj do estas la fundamentaj momentoj en la lingvoteorio de Zamenhof, eldiritaj de li en la nomitaj verkoj?

Zamenhof atestas, ke la socio de lia epoko (t.e. la epoko de la imperiismo) jam estas sufiĉe kreskinta por bezoni lingvon internacian, sed estas pasonta ankoraŭ longa periodo de batalo por enradikigi la lingvon internacian en la vivo.

---

1 Parolado en la Guildhall de London, 1907. Orig. Verkaro, pĝ. 381-382.

Argumentante, ke la lingvo internacia estos nepre enkondu-  
kita pli aŭ malpli frue, Zamenhof eliras el la ĝeneralaĵ  
konsideroj pri utileco de la lingvo internacia: "La homoj  
vivas per vivo konscia kaj senĉese celadas al sia bono".  
Tial por akcepti lingvon internacian sufiĉas "nur ekdeziri  
kaj elekti".

Se du homaj grupoj estas disigitaj unu de alia per ri-  
vereto, sed scias, ke por ili estus tre utile komuniĝadi  
inter si, kaj ili vidas, ke tabuloj por la kunigo de ambaŭ  
bordoĵ kuŝas tute pretaj apud iliaj manoj, tiam oni ne be-  
zonas esti profeto, por antaŭvidi kun plena certeco, ke  
pli aŭ malpli frue tabulo estos transĵetita trans la rive-  
reto kaj komuniĝado estos aranĝita<sup>2</sup>.

Zamenhof konstatis plue, ke la bezono pri lingvo inter-  
nacia jam ekzistas sur bazo de la "fortiĝintaj komuniĝoj  
inter la homoj" kaj tiu ĉi bezono pli kaj pli kreskados kaj  
ĝuste tio neeviteble venigos al enradikiĝo de la lingvo in-  
ternacia en la vivo.

Sed lingvo internacia en la moderna epoko ne povas esti  
lingvo forŝirita de la ĝenerala evoluado de la homa lingvo  
(ekzemple, aprioria filozofia lingvo aŭ eĉ lingvo laŭ tipo de  
l'kompromisa Volapük). Lingvo internacia povas esti nur  
sekva ŝtupo en la lingvoevoluado post la epoko de naci-  
literaturaj lingvoj.

Kun la tuta forto Zamenhof atakas Volapükon pro ĝia ar-  
tefariteco:

Ĝi estas nomita lingvo tutmonda nur pro tio, ke se la  
tuta mondo ĝin ellernos, tiam ĉiuj ĝin komprenos! (Substr.  
L.Z.). Nenian alian econ tutmondan tiu ĉi lingvo havas...<sup>3</sup>

Zamenhof mokas al Schleyer pro lia konvinko, ke kvazaŭ  
sufiĉus nur nomi lingvon internacia kaj oni akceptus ĝin ki-  
el lingvon internacian.

Por ke oni akceptu la lingvon internacian, ne sufiĉas  
kompreni la grandan utilecon pro tio, sed necesas, ke ĝi  
mem en si, laŭ sia strukturo, laŭ siaj elementoj estu inter-  
nacia. En kontraŭa okazo ĉia lingvo, eĉ tute fremda por la  
mondo kultura, povas fariĝi lingvo internacia:

...eĉ la lingvo de Hotentotoj, alportos al la mondo

---

2 Esenco kaj estonteco. Orig. Verkaro, pĝ.286.

3 Esperanto kaj Volapük. Orig. Verkaro, pĝ.264.

grandegan utilon, se la tuta mondo ĝin akceptos! (Substr. L.Z.)<sup>4</sup>.

Deduktante el tiuj ĉi konsideroj, Zamenhof postulas, ke lingvo internacia estu laŭ sia strukturo "natura lingvo", t. e. ke ĉiuj ĝiaj elementoj estu prenitaj el la bagaĝo de la lingvoj ekzistantaj, unuavice el la internacia bagaĝo de tiuj ĉi lingvoj. Krom tio, la lingvo internacia devas esti de la komenco mem "vivipovanta". Tiamaniere, la lingvo internacia estos kiel laŭ sia strukturo (duonartefarita lingvo), tiel ankaŭ laŭ la principoj de evoluo nur sekva ŝtupo post la lingvo "de regula skriba literaturo"<sup>5</sup>.

## INDIVIDUE KREI LINGVON INTERNACIAN ESTAS NEEBLE

Zamenhof ĝenerale ne opinias ebla krei lingvon internacian per individuaj penadoj de unu persono. Ne sufiĉas ankoraŭ artefare, enkabinete krei skeleton de lingvo internacia. Por ke oni akceptu ĝin, por ke ĝi eniĝu en la vivon, ĝi devas fariĝi vivanta lingvo.

A priori oni povis esti preparita, ke lingvo, kreita arte en la kabineto de instruitulo, distingigos per plena manko de vivo<sup>6</sup>.

...en tia grava afero, kiel lingvo tutmonda, la persona juĝo kaj decidoj de unu homo devas havi rolon eble plej malgrandan... Unu homo tie povas esti nur iniciatoro sed ne kreanto<sup>7</sup>.

Decide forĵetante ĉian eblecon pri kreo de vivipovanta lingvo per individuaj penadoj de unu, eĉ la plej genia persono, Zamenhof limigas sian propran rolon en kreado de la lingvo internacia nur kiel aŭtoro de minimuma fundamento por tia lingvo, sufiĉa nur por ke la nova lingvo faru en la socio siajn unuajn paŝojn. La lingvo mem "devas esti kreata de la homa societo kaj de la vivo, tiel kiel ni vidas en ĉiu el la vivantaj lingvoj"<sup>8</sup>.

Nur viva konkursa laboro, ĉe kia ĉio pli bona iom post

---

4 Esperanto kaj Volapük. Orig. Verkaro, pĝ.264.

5 Aldono al la Dua Libro. Orig. Verkaro, pĝ.34.

6 Esperanto kaj Volapük. Orig. Verkaro, pĝ.267.

7 Aldono al la Dua Libro. Orig. Verkaro, pĝ.33.

8 Aldono al la Dua Libro. Orig. Verkaro, pĝ.33.

iom elpuŝas la malpli bonan, -- povas doni efektive bonan kaj vivipovantan lingvon internacian<sup>9</sup>.

## DANĜERO DE DISDIALEKTIĜO NE MINACAS

### AL LINGVO INTERNACIA

Por la lingvo internacia ne ekzistas danĝero eĉ en nia tempo pri dividiĝo je dialektoj, ĉar la tuta lingva evoluo procedas de divideco al unueco. Por pravigi tiun ĉi ideon, Zamenhof mencias, ke jam en la lingvoj naci-literaturaj la momentoj unuigaj superas la disigajn. Kaj "la lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj"<sup>10</sup>.

En la ekzistantaj literaturaj lingvoj ĉiu rajtas uzi kiujn ajn vortojn, formojn kaj neologismojn. Pro tioma libereco la naci-literatura lingvo ne perdas unuecon, ĉar la socia bezono pri unueco estas tiom granda, ke en la procedo de praktika aplikado la nove proponataj vortoj kaj formoj post certa batalo por sia ekzisto aŭ enkondukiĝas en ĝeneralan uzadon aŭ estas forĵetataj de la vivo. Unueco de la lingvo pro tio neniom suferas. Kaj Zamenhof decide ekstaras sur tiun ĉi evoluojon ankaŭ en la rilato de lingvo internacia.

Sed ĉu minacas tia vasta libereco al la lingvo internacia per tio, ke ĝi post kelka tempo diseriĝas je diversaj dialektoj? -- demandas Zamenhof.

Interalie, necesas tie ĉi rimarki, ke eĉ en nia tempo, post jardekoj da praktika kreado kaj aplikado de la helpa lingvo internacia Esperanto, kiu eĉ ete ne perdis unuecon, multaj lingvistoj subtenas tiun ideon, ke la lingvo internacia ĝenerale ne eblas en nia tempo ĝuste tial, ke ĝi eble dividiĝos je dialektoj: "Por longedaŭro de lingvo internacia servas kiel baro la neevitebla disfalo je dialektoj sub influo de lokaj lingvoj", -- tiel parolas prof. Uŝakov en "Malgranda Soveta Enciklopedio" (Vol. V -- "Internacia Lingvo").

Zamenhof respondas tiun ĉi demandon, konsiderante la historian perspektivon. Li diras, ke eĉ dum la pli frua epoko en evoluhistorio de la lingvoj literaturaj tia danĝero jam estis mankanta pro ĝeneralaj kondiĉoj da la epoko. Tiom pli multe ĝi mankos en la epoko de pli supera socia progreso, kiam kreiĝas la lingvo internacia.

9 Aldono al la Dua Libro. Orig. Verkaro. pĝ.34.

10 Aldono al la Dua Libro. Orig. Verkaro. pĝ.34.

...kiu konas iom la historion de la lingvoj, tiu komprenos, ke tiu timo (t.e. pri la disdialektiĝo, E.S.) estas tute senfonda, ĉar ni ĉiuj laboros sur unu fundamento, kaj tiu fundamento, enhavante la tutan gramatikon kaj la pli grandan parton de l'vortoj, kiuj en la parolado estas renkontataj la plej ofte, havos en la lingvo internacia tian saman signifon, kiun en ĉiu lingvo havis tiu lingva materialo, kiu estis en ĝi en la komenco de regula skriba literaturo: estis preta gramatiko, estis granda kolekto da vortoj, sed multaj vortoj ankoraŭ malestis. Tiuj ĉi vortoj estis kreataj unu post unu, laŭ la kreskanta bezono, kaj malgraŭ ke ili estis kreataj dise de malsamaj personoj, sen ia kondukanto aŭ leĝdonanto, la lingvo ne sole ne disdividiĝis, sed kontraŭe, ĝi ĉiam pli unuformiĝis, la dialektoj kaj provincialismoj iom post iom perdiĝis antaŭ la fortiĝanta komuna literatura lingvo <sup>11</sup>.

En la lingvo internacia, lingvo de pli malfrua formaĵo, kiu "pli dependas de la volo de l'homoj, ol de aliaj kondiĉoj, -- tiu proceso de unuformiĝado iros en ĝi multe pli rapide" <sup>12</sup>.

Tiamaniere, la fundamento de lingvo internacia, kiun proponis Zamenhof, estas, laŭ lia opinio, nur tiu skeleto, sur kiu en procedo de kolektiva kreado de l'amasoj "estos ellaborata la efektiva lingvo internacia de l'estonteco" <sup>13</sup>.

Tamen, malgraŭ tio, ke al la lingvo internacia ĝenerale ne minacas la danĝero pri disdividiĝo je dialektoj. Zamenhof postulis de la adeptoj de l'lingvo internacia ĉe la unuaj paŝoj de la movado kiel eble plej severe subtenadi la unucon de la movado. Tio havas grandegan, eĉ decidan signifon en komenco de la movado, kiam la lingvo internacia ne ankoraŭ eniĝis en la vivo. Multajn fojojn Zamenhof ripetadis, ke "ni batalas ne por la formo, sed por la ideo:" se en la internacia lingvo Esperanto ekzistas mankoj, tio ne havas decidan signifon, -- ĉe disvolviĝo de la movado estas garantiita vasta ebleco por kolektiva kreado de la lingvo, ĝia pliboniĝo kaj eĉ ŝanĝoj "ĝis plena nerekonebleco". Kontraŭe, decidan signifon havas la unueco de la movado, -- t.e. ke en komenco de la movado devas esti proponita efektive unueca lingvo internacia, sed ne kelkaj konkurantaj

---

11 Aldono al la Dua Libro. Orig. Verkaro, pĝ.34.

12 Aldono al la Dua Libro. Orig. Verkaro, pĝ.35.

13 Aldono al la Dua Libro. Orig. Verkaro, pĝ.34.

sistemoj. Decidan signifon havas en komenco de la movado "ne teoriaj rezonadoj, sed praktika aplikado de la lingvo".

Por garantii unuecon de la lingvo internacia kaj samtempe la eblecon evoluigi ĝin plej vaste en procedo de kolektiva kreado, Zamenhof proponis la principon pri netuŝebleco de la "Fundamento" de la lingvo internacia.

## STADIECO EN LA LINGVA EVOLUO LAŬ ZAMENHOF

Sed ĉu estos tiu "lingvo internacia de l'estonteco", pri kiu ni parolis pli supre, ankaŭ jam tiu lingvo universala, kiu en la estonteco anstataŭos la naciajn lingvojn por la unueca homaro? Zamenhof respondas tion negative.

"Lingvo internacia" kaj "lingvo tutmonda" estas du tute malsamaj objektoj, kiujn miksi inter si oni neniel devas. (Substr. E.S.) 14.

Kontraŭstarigante la kelkajn supremenciitajn citaĵojn, ni vidas, ke Zamenhof prezentis al si la ĝeneralan evoluon de la homa lingvo en aspekto de la jena skemo: epoko de la buŝaj lingvoj (dialektoj), epoko de la literatur-naciaj lingvoj ("de regula skriba literaturo"), epoko de la helpa lingvo internacia kaj, fine, epoko de la tutmonda lingvo universala. Laŭvere, ni havas tie ĉi nur la plej ĝeneralan skizon pri konsekvenca vico de la lingvaj stadioj. Tamen, jam tiu ĉi skizo enportas tutan revolucion en la koncepton de la burĝa lingvoscienco pri historio de la lingvo.

Ni komparu tiun ĉi skemon de la lingva evoluo kun la ankoraŭ malmulte konata citaĵo el Marx pri evoluo de la lingvo, en kiu li parolas pri transiro el stadio de "antaŭkultura spontane kreiĝinta" lingvo al stadio de naciaj lingvoj kaj fine difinas la pluan transiron al plena artefara "kontrolado" de la lingvo.

Marx kaj Engels skribis (en "Die deutsche Ideologie"):

En ĉiu alia plenevoluinta lingvo, cetere, la origina natureco de la parolo leviĝis al la nivelo de nacia lingvo, parte pro la historio de la lingvo-evoluo el la jam preta materialo, kiel ĉe la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj, parte pro la interkruciĝo kaj intermiksiĝo de nacioj, kiel ĉe la angla, parte pro la koncentriĝo de dialektoj interne de nacio, baziĝanta sur ekonomia kaj politika koncentriĝo.

---

14 Esenco kaj estonteco. Orig. Verkaro, pĝ.281.

Estas memkompreneble, ke la individuoj siavice transprenos plenan kontrolon ankau super tiu ci produkto de sia genro. (Substr. E.S.)

Pli malfrue, en 1930, k-do Stalin pli precize formulis la estontecon de la homa lingvo kiel unueca, universal, -- kaj ni ne povus ne rimarki, kiom multe la scienca intulcio de Zamenhof proksimigis lin al la marksisma koncepto pri ŝanĝiĝo de stadioj en la historio de lingvo.

Laŭvere, Zamenhof, ne estante marksano, ne povis science surbazi tiun ci skemon pri evoluo de la lingvo. Sed tiu fakto, ke ĝuste ĝin li metis en la fundamenton de la de li ellaborita teorio pri helpa lingvo internacia, grandparte klarigas al ni la kaŭzojn de la definitiva sukceso de la helpa lingvo Esperanto kaj ĝenerale de la movado por helpa lingvo internacia sur bazo de la lingvaj principoj de Zamenhof.

## ROLO KAJ LOKO DE LINGVO INTERNACIA EN NIA EPOKO

Ekkonsciinte tiun veraĵon, ke lingvo internacia povas aperi nur ĉe certa stadio en evoluo de la homa socio, Zamenhof ne povis ne provi, difini rolon kaj lokon de tiu ci lingvo dum la proksima epoko. Dum la epoko de kreskado de l'imperiismo, kiam atingis sian superan evolugradon la politiko de l'kapitalistaj ŝtatoj, direktita por sufoko kaj asimilado de la subpremitaj nacioj, por incitado de naciaj antagonismoj, por perforta trudado de lingvoj de la superantaj nacioj al la nacioj subpremitaj, -- Zamenhof ne povis ne reflekti en siaj lingvaj konstruoj la nacian momenton, mem suferinte la tutan teruron de la nacia politiko de la carisma reĝimo, mem apartenante al unu el la plej subjugigitaj nacioj.

Rimarkante, ke la lingvo internacia en nia epoko ne povas esti lingvo universal de l'estonteco, li tamen ne vidis malfeliĉon en tio, se kun la tempo la homaro unueciĝos kaj havos unu komunan lingvon.

Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistus la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo <sup>15</sup>.

---

<sup>15</sup> Esenco kaj estonteco. Orig. Verkaro, pĝ.281.



Fidela al sia idealismo, Zamenhof ne komprenis la ĉefan kaŭzon de la estonta kunfandiĝo de la nacioj, li metis enkondukon de la lingvo internacia depende de l' aliigo de "konvinkoj kaj opinioj de la homoj".

Se ni supozus, ke fariĝos iam kunfluiĝo de la homoj en unu ĉiuhoman popolon, en tiu ĉi "malfeliĉo" (kiel nomos ĝin la naciaj ŝovinistoj) estos kulpa ne la lingvo internacia, sed la aliĝintaj konvinkoj kaj opinioj de la homoj<sup>16</sup>.

Tiamaniere ni vidas tie ĉi, ke Zamenhof ne konsideris la lingvon internacian kaŭzo laŭ si mem, kiu povas en la estonteco venigi al kunfandiĝo de la nacioj kaj al la lingvo internacia.

Sub influo de kio ŝanĝiĝas tiuj ĉi "konvinkoj kaj opinioj", kiuj venigos al unueco de la lingvo, Zamenhof ne diras. Ne estante marksano, li ne povis prezenti al si klaran bildon pri la decida influo de l' ekonomia bazo en la socio al ŝanĝiĝo de l' ideologio de la homoj. Laŭvere, ĉe li traglitas treege nebule la ideo, ke al afero de tiu ĉi alia lingva formajo influas la evoluo de sociaj "komunikiĝoj" kaj ke la lingvon internacian kreos la "praktika bono kaj profito"<sup>17</sup>.

## LINGVO INTERNACIA DE LA PROKSIMA ESTONTECO

Se la lingvo internacia de la nuntempo ne povas pretendi la rolon de la lingvo universala de l'estonteco, kia do estas ĝia rolo en la nuntempa diverslingva socio? Tiu ĉi rolo, laŭ Zamenhof, povas esti nur rolo de helpa lingvo. La lingvo internacia "devas servi nur por komunikiĝoj internaciaj kaj por tiuj produktoj de la homa spirito, kiuj havas egalan signifon por la tuta homaro"<sup>18</sup>. "...ne entrudiĝante en la homan vivon de la popoloj",<sup>19</sup> la lingvo internacia devas servi kiel helpa ilo por internaciaj rilatoj. Ĉe tio, kiel ni vidis pli supre, Zamenhof trankviligas la naciisme agorditajn homojn, kiuj timas, ke la lingvo internacia per si mem povas venigi al neniigo de la lingvoj naciaj. Zamenhof diras, ke kvankam tio ne estus malfeliĉo, tamen la helpa lingvo internacia ne povas kaŭzi tion. Eĉ kontraŭe:

16 Esenco kaj estonteco. Orig. Verkaro, pĝ.281.

17 Esenco kaj estonteco. Orig. Verkaro, pĝ.286.

18 Nia afero. Orig. Verkaro, pĝ.145.

19 Unua Libro. Orig. Verkaro, pĝ.18.

Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado ... (Substr. E.S.)<sup>20</sup>.

Zamenhof jene klarigas, kial ĝuste la lingvo internacia, kiam ĝi enkondukiĝos en ĝeneralan uzadon, akcelados "fortiĝadon kaj plenan ekfloradon" de la naci-literaturaj lingvoj:

...dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem konstante kunpuŝiĝantaj unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon; sed kiam ĉiu el ni devas ellernadi nur unu fremdan lingvon (kaj ankoraŭ tre facilan), ĉiu el ni havos la eblon ellerni sian lingvon fonde, kaj ĉiu lingvo, liberiĝinte de la premado de multaj najbaroj kaj konservinte plene por si sola ĉiujn fortojn de sia popolo, disvolviĝos baldaŭ plej potence kaj brile<sup>21</sup>.

Tiun ĉi ideon Zamenhof ripetis ne unufoje en siaj verkoj. Zamenhof deduktas el la samaj konsideroj pri neceseco de neŭtraleco por la lingvo internacia rilate al la lingvoj naciaj, kiam li parolas pri tio, kia devas esti la lingvo internacia: ĉu ĝi estos unu el la naciaj lingvoj aŭ lingvo tute neŭtrala, apartenanta al neniu el la nacioj? Li argumentas, ke lingvo internacia de nia epoko povas esti laŭ sia strukturo nur lingvo neŭtrala.

Zamenhof opinias ne senbaza tiun motivon, ke se lingvo internacia fariĝus ia nacia lingvo, tio estus sekvo de la subpremado kaj englutado de aliaj popoloj flanke de unu el la plej potencaj nacioj. Krom tio enkonduko de tia lingvo internacia ankoraŭ pli akcelus ĉi tiun subpremadon kaj englutadon. Deduktante el tiu ĉi konsidero kaj ankaŭ el la pure lingvaj konsideroj pri neceseco krei la lingvon internacian sur grundo de tiuj internaciaj elementoj, kiuj jam ekzistas en la bagaĝo de l' ekzistantaj naciaj lingvoj, -- Zamenhof haltas ĉe la ideo pri tio, ke neŭtrala lingvo internacia en nia epoko povas esti nur lingvo duonartefarita, nur iom pli artefarita, ol la lingvoj literaturaj.

20 Esenco kaj estonteco. Orig. Verkaro, pĝ. 281-282. Ankaŭ: Nia afero (1892), pĝ. 145.

21 Esenco kaj estonteco. Orig. Verkaro, pĝ. 282.

Ni notu, ke Zamenhof ribelas tie ĉi kontraŭ la disvastigita en lia tempo (kvankam verŝajne ne konata de li) teorio de Kautsky kaj pli malfrue ankaŭ kontraŭ teorio de A. Bogdanov pri tio, ke estonta unueca lingvo fariĝos unu el la plej potencaj naciaj lingvoj (laŭ Kautsky -- germana lingvo, laŭ A. Bogdanov -- angla lingvo)<sup>22</sup>. Tie ĉi la ideo de Zamenhof pri neŭtraleco de la lingvo internacia de l'estonteco plene koincidas kun la tezo de la marksismo-leninismo:

En mia parolado en la j. 1925 mi kontraŭparolis naciŝovinistan teorion de Kautsky, konforme al kiu la venko de proletara revolucio meze de la pasinta jarcento en unuigita aŭstrigermana ŝtato devis venigi la kunfandiĝon de nacioj en unu komunan germanan nacion kun unu komuna germana lingvo kaj al germanigo de ĉefoj. . . . naciaj lingvoj neeviteble devos kunfandiĝi en unu komunan lingvon, kiu, kompreneble, estos nek rusa, nek germana, sed io nova<sup>23</sup>.

## ZAMENHOF PRI LA SOCIA LOKO DE LINGVO INTERNACIA

Zamenhof estis fremda al komprenado de klasbatalo. Sed li mem ne povis ne reflekti en sia teorio sian klasan etburĝan vidpunkton. Li opiniis, ke la lingvo internacia de la nuntempo povas ekzisti kaj evolui nur kiel lingvo de la plej larĝaj amasoj kaj precipe de la malsuperaj "nekleruloj", de la "lingve neinstruitaj" personoj<sup>24</sup>.

Tiu ĉi ideo estas ĝenerale ĝusta, sed ĝi estas klase ne esprimita: la lingvo internacia havas estontecon nur kiel klasa lingvo de la proletaro; la lingvo internacia estas akceptota de la vastaj laborular-amasoj nur ĉe la kultura hegemonio de la proletaro.

Tamen historie Zamenhof faris grandan paŝon antaŭen. Ni komparu, ekzemple, Zamenhof kun la prelato Schleyer, kiu estis destininta sian Volapükon por la "kleraj homoj de la tuta mondo". Zamenhof opiniis, ke en nia tempo povas havi estontecon nur la lingvo de la malpli altaj "klasoj de la societo", tia lingvo, kian povas lude ekposedi "eĉ la plej

<sup>22</sup> A. Bogdanov, "O proletarskoj kulture". Moskva, 1925.

<sup>23</sup> J. Stalin, Parolado ĉe la XVI-a Kongreso de KP(b)SU, 1930. Vidu la broŝuron: J. Stalin, Kulturo nacia kaj internacia. Eld. "Ekrelo". Leipzig, 1930, pĝ. 26-27.

<sup>24</sup> Originala Verkaro, pĝ. 96, 306.

malriĉaj kaj senkleraj vilaĝanoj" 25. Deduktante el tio ĉi, li ekzemple kruele kritikis la provojn proponi kiel lingvon internacian la latinan lingvon, ĉu en ne ŝanĝita, ĉu eĉ en simpligita aspekto. Rilate al la projekto de "Nov Latin" li diris:

Ne parolante jam pri tio, ke la "Nova Latino" ne povas fariĝi lingvo tutmonda pro tiuj samaj kaŭzoj, kiel la malnova latino (manko de komprenadoj nuntempaj k. c.), ni supozu por momento, ke ĝi portas en si la eblon fariĝi tutmonda, kaj ni tiam demandos la aŭtoron: por kiu tia lingvo servus? Homoj konantaj la malnovan latinon ne bezonas la "Nov Latin"; homoj ne konantaj la latinon eterne devos tenadi en la mano vortaron latinan kaj malgraŭ tio neniam povos uzi la novan lingvon 26.

Tia lingvo, laŭ opinio de Zamenhof, prezentos el si "ne lingvon internacian en la vera senco de tiu ĉi vorto, sed nur lingvon internacian por la pli altaj klasoj de la socio". (Substr. L.Z.) 27.

Tiamaniere ni vidas, ke laŭ Zamenhof la lingvo internacia en ĝusta kompreno de tiu ĉi vorto povas esti nur lingvo de la plej vastaj amasoj de "neinstruitaj" homoj.

Tiu ĉi larĝa demokratismo de Zamenhof efektive estis respondanta al la bezonoj de la epoko. Ĝuste al vastaj amasoj de "neinstruitaj" homoj, ne posedantaj lingvojn alilandajn, "trafas ofte en la staton de mutulo" 28, malgraŭ tio, ke ili jam atingis la bezonon pri internacia komunikado.

La unuaj jardekoj de disvolviĝo de la movado por helpa lingvo internacia montris, ke ĝuste la etburĝa malsupera intelektularo estis antaŭ la imperiista milito 1914-1918 tiu amaso, kiu precipe estis antaŭenmovanta la aferon de lingvo internacia. La vasta laborista movado por lingvo internacia, en mallonga tempo superkreskanta la burĝan, disvolviĝas en internacia skalo nur post la imperiista milito kaj post la Oktobra revolucio 1917. Nur la proletaro -- la vera portanto de la ideo pri lingvo internacia -- donis al la movado tiun enhavon, kiu pravigis ĝin ideologie kaj liveras al ĝi perspektivojn.

(daŭrigota)

---

25 Esenco kaj estonteco. Orig. Verkaro, pĝ.299.

26 Pri la manieroj de vastigado. Orig. Verkaro, pĝ.77.

27 Esenco kaj estonteco. Orig. Verkaro, pĝ.299.

28 Ekspono de la motivoj. Orig. Verkaro, pĝ.212.

E. SPIRIDOVIĈ

## GENIA LINGVISTO VENKITA DE ETBURĜECO

(daŭrigo)

EN SERĈADO DE MOVFORTO POR LINGVO INTERNACIA

Al la individua kreado de lingvo internacia Zamenhof kontraŭstarigis la kolektivan. Tiu ĉi ĝusta principo finfine do venkis. Zamenhof komprenis, ke ĉiu lingvo estas "fakto socia" kaj ke la lingvo internacia ne estas escepto. Kiel fakto socia, la lingvo internacia povas esti nur sekvo de bezono pri ĝi flanke de internacia socia forto, por kiu ĝi estus ilo de praktika komuniĝo, organisme devenanta el la tuta evoluhistorio de tiu ĉi forto, el ĝia politika mondkoncepto, el perspektivoj de ĝia disvolviĝo. Unuvorte, tiu ĉi socia forto devas fariĝi portanto de la ideo pri lingvo internacia, siavice devenanta el la evolutendenco de tiu ĉi forto al internacia unuiĝo de la nacioj kaj al ilia estonta kunfandiĝo.

Zamenhof firme konsciis, ke por la definitiva sukceso de lingvo internacia tiu ĉi lasta devas troviĝi en la manoj de tia socia forto, kiu estus unuiĝita internaciskale ne ekstere, ne formale, per aplikado de tiu ĉi lingvo, sed per iu "inter-na ideo", kiun li treege nebule imagis kiel ideon pri "tutmonda frateco de popoloj kaj klasoj". Venko de la lingvo internacia devus okazi laŭ Zamenhof kiel rezulto de disvastiĝo kaj venko de tiu ĉi ideo.

Kia do estas tiu forto, kiu venigos la mondon al unueco? Kiaj devas esti ĝiaj soci-politikaj principoj? Tion ĉi

Zamenhof estis neniam kompreninta. Li opiniis, ke la esperantistoj, dispolvigitaj tra la tuta mondo, estis jam tiu ĉi socia forto. Vidante, ke inter la esperantistoj, unuigitaj nur ekstere pere de la lingvo internacia, regas diversspecaj antagonismoj — klasaj, naciaj, religiaj, — li opiniis, ke oni povas per predikado de tiu ĉi interna, ĉion paciganta ideo firme kunforĝi tiun konglomeraĵon de la klasgrupoj, el kiuj estis konsistanta la movado por helpa lingvo internacia. El tio ĉi devenas lia nelacigebla pacifista predikado pri frateco de la popoloj.

En la lastaj jaroj antaŭ la imperiisma milito Zamenhof klopodis eĉ, fondi ian specon de nova religio, kiu fortike kunforĝus la klase diverskoloran kolektivon esperantistan per ligaĵo de frateco sendepende de ĉiuj klasdiferencoj ĉe ĝiaj membroj, sur bazo de idealoj de "homaranismo", — tiel li estis nominta sian pacifisman instruon pri frateco de ĉiuj homoj de la mondo. Tamen la praktiko alportis kompreneble al tiu ĉi etburĝa revanto nenion krom disreviĝoj. Ju pli multe kreskis la movado esperantista, des pli multe progresis en ĝi diversaj sociaj klasantagonismoj. La burĝaro volonte akceptis la lingvon internacian kiel interligilon, sed restis surda kontraŭ la pacifismaj alvokoj de Zamenhof. La "interna ideo" en manoj de hipokritaj reprezentantoj de la burĝa Esperanto-movado fariĝis nur mensoga frazo, same kiel ankaŭ ĝenerale la "paco" en buŝoj de la etburĝaro. Laŭgrade kun kreskado de la movado esperantista tiu ĉi frazo en la burĝa alo de la movado por lingvo internacia fariĝis la plej "ŝatata" rimedo de klasbatalo.

Tamen la milito imperiisma senmaskigis la tutan falsecon de la burĝa pacifismo. Hieraŭaj amikoj, kiuj ĵuris eternan fratecon kaj amon, hodiaŭ transformiĝis je frenezaj malamikoj. Ne helpis tie ĉi kompreneble ankaŭ Esperanto kun ĝia "interna ideo". La tuta internacia unueco de la burĝaj esperantistoj disfalis, kiel ludkarta dometo. Malespere Zamenhof trovis nenon pli bonan ol turni sin al la diplomatoj de la landoj militantaj, al tiuj ĉi ĉefkomizoj de l'imperismo, kun admonoj, ne forgesi pri frateco de la popoloj. Kompreneble, Zamenhof ne ricevis respondon kaj ne povis eĉ ricevi ĝin. Tia estas la tragedio de tiu ĉi homo, kiu pli malproksime ol ĉiuj liaj samtempuloj faris paŝon antaŭen en kompreno de l'esenco de la helpa lingvo internacia kaj de la kondiĉoj por ĝia disvastiĝo kaj enkonduko, sed kiu ne scipovis elsalti el la kadroj de sia klaso: la genian aŭtodi-dakton-lingviston venkis etburĝeco,

Tamen ankoraŭ dum la vivo de Zamenhof en la movado esperantista komencis rapide kreski ĝuste tiu socia forto, kiu solidariĝis internaciskale ne sur la ekstera bazo de l' aplikado de la lingvo internacia, sed sur la bazo de tiu interna kunfandiĝo, kiun liveras nur la aparteno al unu klaso. Por tiu ĉi socia forto la lingvo internacia estas nur rimedo por pli firme kaj senpere interligiĝi en skalo internacia. Neniajn eksterajn, artelpensitajn "internajn ideojn" tiu ĉi socia forto bezonas, ĉar ĝi posedas tiun internan ligilon, kiun donas la tasko pri komuna batalo en skalo internacia por siaj klasaj, ekonomiaj kaj politikaj interesoj.

Tiamaniere Zamenhof estis ĉe la ĝusta vojo, kiam li konsideris, ke por ke la lingvo internacia venku kaj por ke ĝin akceptu la mondo necesas iu socia forto, iu sociaj stimuloj, kiuj puŝas antaŭen la movadon por helpa lingvo internacia.

Homo, ne komprenanta la klasbatalon, sed treege suferanta pro la nacia dividiteco de la mondo, li revis pri la estonta frateco de la nacioj. Tamen li tute ne komprenis, ke tiu ĉi frateco de l'nacioj en la tuta mondo povas aperi nur en rezulto de klasbatalo post definitiva venko de la proletaro en la tuta mondo. Ĝuste la nekompreneo pri tio ĉi venigis lin al la revo pri nova internacia kolektivo esperantista, kiun unuigas la "interna ideo"; ĝi do, laŭ lia opinio, estus tiu forto, kiu rezulte unuigus la tutan mondon kaj venigus al paco universalaj. La plua disvolviĝo de la klasbatalo en la movado esperantista plene evidentigis la tutan erarecon de la etburgaj opinioj de Zamenhof.

## SIGNIFO DE LA LINGVOTEORIO DE ZAMENHOF

En batalo por lingvo internacia Zamenhof starigis centre ne "teoriajn rezonadojn", sed praktikan laboron. Tial li donis siajn teoriajn tezojn ĉefe por meti ilin en bazon de sia "Fundamento" por helpa lingvo internacia. Pli poste lia tuta laboro estis pasanta en praktika gvidado super la movado por helpa lingvo internacia, en gvidado supre la disvolviganta kreado de la helpa lingvo internacia flanke de la amasoj da adeptoj de tiu ĉi lingvo. El tie ĉi fariĝas klare, kiel li ne prezentis sistemece sian teorion.

En la procedo de batalo por helpa lingvo internacia la vivo estis elstariganta tiujn aŭ aliajn problemojn kun teoria karaktero kaj li provis ilin solvi laŭforte. Samtempe, kiel ni jam vidis, la ĉefan atenton li estis direktanta al funda-

mentigo ne de formalaj momentoj en strukturo de helpa lingvo internacia, sed de la sociaj: loko de helpa lingvo internacia en evoluo de la homa lingvo, kondiĉoj de ĝia kolektiva kreado, ĝia signifo dum nia kaj la plej proksima epokoj k.t.p. Samtempe Zamenhof elmontris vastperspektivan rigardkapablon rilate al komprenado de la ĉefe problemoj, senpere ligita kun la disvolviĝo de helpa lingvo internacia, nome de la nacia problemoj, — kaj tiu ĉi fakto elstarigis lin el tiu etburĝa medio, en kiu li vivis kaj al kies ideologio li tamen portis tributon.

Dum lia epoko en la medio de social-demokratio akre distingigis la etburĝecaj teorioj de Kautsky kaj A. Bogdanov — pri kunfluiĝo de nacioj per asimilado de aliaj nacioj kaj lingvoj al unu potenca nacio; ankaŭ tiuj de Bauer, Semkovskij kaj aliaj — pri tio, ke la epoko de socialismo alportas ne okazontan kunfluiĝon de nacioj, sed kontraŭe — ekfloradon de nacia aparteco. Zamenhof estis staranta flanke for de la aktualaj problemoj de politika karaktero, flanke for de la marksismo, kaj verŝajne li eĉ ne konis la fundamentajn tezojn de la marksismo (en liaj verkoj ni ne povas trovi postsignojn de senpera influo de marksisma teorio al li). Tamen, malgraŭ tio, Zamenhof evidente nur dank' al sia genia intuicio konstruis la teorion pri disvolviĝo de helpa lingvo internacia, deduktante el la principoj, kiujn plene elmontris kaj progresigis nur la revolucia marksismo kaj la pli malfrua praktiko de socialisma konstruado en Sovet-Unio. Zamenhof celis al estonta kunfluiĝo de nacioj, sed li observis la vojon al ĝi ne tra asimilado de unuj nacioj kaj lingvoj al la aliaj, sed kontraŭe — tra la transira epoko de la plej larĝa ekflorado de naciaj lingvoj kaj tra disvolviĝo de helpa lingvo internacia, kiu akcelas tiun ekfloradon de la lingvoj.

Aliflanke, dum en la sfero de lingvoscienco regis la plej reakciaj konceptoj pri la lingvo, trapenetritaj per individualismo kaj fetiĉismo, Zamenhof prezentis lingvorteorion, kiu tiomgrade kontraŭdiras ĉiujn poziciojn de la burĝa lingvoscienco, ke la patentitaj lingvistoj ankoraŭ ĝis nun deziras nenion scii pri ĝi. Kaj samtempe tiu ĉi teorio plene koincidas kun la ĉefaj tezoj de marksismo en la sfero de lingvoproblemoj: la vojo al disvolviĝo de lingvo konkukas el multeco al unueco, la akcento ripozas sur kolektiva kreado de la lingvo anstataŭ sur la individua, la vojo venigas al ĉiam pli granda evoluo de la arteco en la lingvo.

Eĉ en tiu regiono, kie Zamenhof tributis je sia aparteco



al la klaso de etburĝaro, kie la genia lingvisto estis venkita de etburĝeco, en siaj pacifismaj elpenaĵoj (en ilia lingva reflektiĝo) — Zamenhof elmontris sin pli progresema ol ekzemple liaj kontraŭuloj, la idistoj.

Kies devizo en la burĝa movado por helpa lingvo internacia estas pli proksima al la proleta; ĉu tiu de l' idistoj, kiuj ripetadis, ke la lingvo internacia estas nur ilo por internacia komunkiĝo kaj nenio pli, ĉu tiu de l' esperantistoj — sekvantoj de Zamenhof, kiuj interligis la movadon por lingvo internacia kun "interna ideo" de la lingvo? Unuavide ŝajnas, kvazaŭ tiu de l' idistoj. Sed tio ne estas ĝusta. Respondon donis jam la historio: la proleta movado por lingvo internacia ekiris la vojlinion de Esperanto.

Estus naive pensi, ke tio okazis nur dank'al la strukturaj avantaĝoj de Esperanto super Ido. Zamenhof sufiĉe kompreneble montris, ke la komencaj kvalitoj de tiu aŭ alia projekto de lingvo internacia, akceptita en la fundamenton de la movado, ne ludas decidan rolon, kaj ke la ĉefaĵo troviĝas ne en formo, sed en la socia enhavo — en la principoj, metitaj en la fundamenton de la kolektiva lingvokreado.

La Zamenhofaj serĉadoj de tiu socia forto, kiu estas ideportanto de la lingvo internacia, esprimitaj de li en lia instruo pri "interna ideo" de l' esperantismo, estas nur sekvo, logike necesa konkludo el liaj sociaj pozicioj rilate al disvolviĝo de lingvo internacia. Elĵeti la "internan ideon" el ĉiuj konstruoj de Zamenhof — signifus forigi fundamenton el sub la tuta konstruaĵo. La idistoj, ekprovintaj fari tion, restis ĝuste en tia situacio, — ili estis devigitaj forĵeti ankaŭ ĉiujn sociajn momentojn en la teorio de Zamenhof kaj komenci en sia kreado de Ido, ripeti la delonge forlasitajn de la vivo postrestaĵojn de lingvoutopiismo kun ties individuismo.

Ni ripetas, ke Zamenhof ĝuste provis trovi la socian portanton de la ideo pri lingvo internacia. Sed li, estante etburĝo laŭ siaj politikaj vidpunktoj, estis serĉanta tiun ĉi ideportanton konforme al "idealoj" de la etburĝaro — en "superklasa" socio. El tio ĉi devenas la tuta interna kontraŭdirpleneco kaj falseco de la elpensita de li "interna ideo" de esperantismo.

La proleta movado por lingvo internacia, heredinte la lingvon Esperanto kaj la Zamenhofajn komencetapajn evolu-principojn de la movado por helpa lingvo internacia, tute nature forĵetis la "internan ideon" de Zamenhof kiel senbezonan rubaĵon. Kaj tio okazis, ĉar ja la proletaro mem es-

tas ideportanto de la lingvo internacia. "Internan ideon de la lingvo intenacia prezentas ĝuste tiu movforto por soci-evoluo de la nuntempo, kiu transformas la proletaron je entombiganto de kapitalismo kaj konstruanto de nova socialisma mondo, detruanta ĉiujn kontraŭdiraĵojn de la reĝimo kapitalista, inkluzive la naciajn kaj lingvajn.

Tiamaniere dialektike estas klarigata la neado de l' "interna ideo" de Zamenhof flanke de la proleta movado por lingvo internacia kaj samtempe la sekvado laŭ liaj postsignoj en la plua pliprofundigo kaj jam scienca surbazigo de lia genia instruo pri helpa lingvo internacia, kiel pri socia fenomeno, rezultanta el la tuta antaŭirinta lingvoevoluo.

## NOIRÉ, MARR, ZAMENHOF

Ĉio supredirita montras, ke Zamenhof estis unu el tiuj nemultaj burgaj lingvistoj, kiuj intuicie multe alproksimiĝis ĝis la fundamentaj tezoj de la marksisma lingvoscienco, samvice kun Noiré kaj akademiano Marr. Ĉiu el ili prilaboris diversajn fakojn de la lingvoscienco. Noiré prezentis teorion pri labororigino de la lingvo, kies tezoj enportis freŝan fluon en la komprenon pri la problemo de lingvodeveno. La akademiano Marr, ellaborinta sian "jafetidan" lingvorteorion ankoraŭ antaŭ 1925, kiam li ne estis ankoraŭ veninta al la marksismo, tutplene frakasis la "piramidon" de l'eŭropa lingvoscienco, starintan sur sia pinto (komenca unueco de l'parolo), metis tiun ĉi piramidon sur sian bazon (evoluo el komenca multnombro de la lingvoj al unueco de l'parolo) kaj apogis sur la materialismaj principoj la tutan metodologion de la lingvoscienco. Zamenhof prilaboris la teorion pri transiro el naci-literaturaj lingvoj al lingvo universala; li starigis esence sur scienca grundon serĉadojn en sfero de lingvo internacia kaj transportis la lingvosciencan el sfero de teoriaj konstruoj en sferon de praktika kreado de la estonta lingvo.

Noiré, Marr, Zamenhof enigis en siajn teoriojn ankaŭ aron da eraraj tezoj — samvice kun geniaj "trabriloj de l'ideoj" (Engels). La marksisma lingvoscienco havas la taskon, ĉerpinte el tiuj ĉi teorioj pozitivajn elementojn, science kontroli ilin, submeti la erarojn al severa kritiko, rigore sistemigi iliajn disigitajn serĉadojn.

Se oni multe skribis pri teorio de Noiré, se la jafetida teorio de l' akademiano Marr posedas grandan literaturon

kaj li mem, transirinte al la marksismo, havas nun la eblecon por la plej vasta scienca tralaboro kaj pruvesploro de sia teorio, — kontraŭe, pri la teorio de Zamenhof oni devas diri, ke ĝi estas la malplej prilaborita de la lingvoscienc-literaturo, malgraŭ ke ĝi tuŝis unu el la plej aktualaj problemoj de la marksisma lingvoscienco — la taskon krei lingvon universalan de l'estonteco.

Tial antaŭ la proleta movado por helpa lingvo internacia, staranta tutplene sur la grundo de marksismo, ekstaras la tasko, kiel eble plej larĝe trastudi la heredaĵon de Zamenhof en liaj sukcesoj kaj eraroj, science trakontroli kaj surbazigi tion valoran, kion donis al Zamenhof nur lia brila intuicio, kaj altiri al la teorio de Zamenhof atenton de la marksanoj-lingvistoj, starantaj ekster la movado por helpa lingvo internacia. Tiu ĉi laboro dum la lasta jardeko estas jam komencita, sed ni ankoraŭ ĉiam staras ĉe ĝia fundamento mem.

Elrusigis: N - u l o

## E R A T U M O

por "Personaj Nomoj de Zamenhofa Familiano" (en n-roj 71 kaj 72)

n-ro	paĝo	kolono	linio	anstataŭ:	devas esti:
1(71)	5	2	9-10	"La avino de la Majstro de la patra flanko"	Sed ŝia matrikulita nomo
2(72)	16	1	9	Zefaris	Zefaria
"	16	1	10	Ĥara	Ĥava
"	16	1	3 de subo	Jofiak	Jicĥak
"	17	1	21	la	al
"	18	2	2 de subo	el	al
"	20	1	4	Tamen	Temas
"	20	1	12	kamparo	kamparano
"	22	2	11	Michie-	Mickie-
"	22	2	13	certe	cetere